Något pluggande i böcker och hemläxor o. d. är numera inte nödvändigt för att lära sig esperanto. Den direkta metoden är lättare och mycket bättre – för övrigt är det ju ingen svårighet alls att lära sig esperanto slutar dr Szilágyi, som redan på tisdagskvällen börjar att undervisa stockholmarna enligt ljusbildsmetoden, då esperantisterna börja sin hösttermin med ett litet offentligt samkväm i Viktoriasalen.

Hungara esperantisto en Stokholmo – Ungersk esperantist i Stockholm

https://biblioteko.esperanto.se/gazeteltondoj/1933/330906_Szilagy_i_om_esperantisterna_i_Hitlertyskland.PDF

Stokholma gazeto skribas:

D-ro Ferenc Szilágyi el Budapesto vizitos la stokholmajn esperantistojn dum monato kaj donos al entuziasmaj studentoj fulmkurson pri la Internacia Helpa Lingvo dum ĉi tiu tempo.

– La instrumetodo, kiun mi uzas, estas kombinita diapozitiva kaj parola metodo, emfazas d-ro Szilágyi por St.T.D. – Mi konkludis, ke la vid-memoro estas tre grava en lingvoinstruado. Tial mi uzas epidiaskopon por montri kaj la vorton mem kaj la afero, kiun la vorto esprimas lige al la rekta parolmetodo, kaj gis nun ĝi bone funkcii.

La disvastiĝo de Esperanto nuntempe? Jes, Anglio estas probable la lando, kie ni estas plej bone organizitaj. En Germanio ni antaŭe estis forte ankritaj, sed nun estas tiom da aliaj aferoj pripensindaj. En Bulgario 33% de la studentoj estas esperantistoj. Kaj en Japanio nia helplingvo estas tre disvastiĝinta en la

En stockholmstidning skriver:

Dr Ferenc Szilágyi från Budapest gästar en månad framåt Stockholms esperantister och ger under denna tid hugade elever en snabbkurs i det Internationella hjälpspråket.



– Den undervisningsmetod jag använder är en kombinerad ljusbilds- och talmetod, framhåller dr Szilágyi för St.T.D. – Jag har nämligen kommit underfund med att synminnet betyder mycket vid språkundervisningen. Därför visar jag medelst balloptikon såväl själva ordet som den sak ordet uttrycker i samband med direkt talmetod, och det har hittills slagit bra ut.

– Esperantos utbredning i närvarande stund? Ja, England är väl det land, där vi äro bäst organiserade. I Tyskland voro vi förr starkt förankrade, men där har man ju nu så mycket annat att tänka på. I Bulgarien är 33% av studenterna esperantister. Och i Japan är vårt

universitatoj. – La urbestro en Tokio estas esperantisto.

Marde vespere je la 8a horo la stokholmaj esperantistoj okazigos publikan feston en Viktoriasalen.

Tie estos muziko, filmprezentado kaj teatra prezentado, kaj ankaŭ d-ro Szilágyi prelegos kaj donos provan lecionon.

hjälpsspråk mycket utbrett vid universiteten – Själv borgmästaren i Tokio är esperantist!

På tisdagskvällen kl 8 hålla stockholmsesperantisterna en offentlig fest i Viktoriasalen.

Där blir det musik och filmföreläsning och teaterföreläsning varjämte dr Szilágyi håller föreläsning och ger en provlekcion.

Iam estis esperantoklubo en Borås

En gång fanns det en esperantoklubb i Borås

Inga Johansson skribas:

Regina EMSON (naskiĝis en 1908, mortis la 26-an de majo 2000). Ŝi estis estonino edziniĝinta al sveda esperantisto en la 1930-aj jaroj. Dum preskaŭ duona jarcento ŝi laboris kiel delegito en Borås. Ŝi estis proksima amiko de Szilágyi.

Jag vet att **Regina Emson** (f. 1908, d. 26 maj 2000) från Estland var medlem i Borås esperantoklubb. Gifte sig med en svensk på 30-talet. Under nästan ett halvt sekel var hon delegat för UEA. Hon var nära vän med Szilágyi.

https://eo.wikipedia.org/wiki/Regina_Emson



El Borås Tidning – Från Borås Tidning

per www.esperantobiblioteko.se



Novaj esperantokursoj en Borås 18/1 1936

Laŭ la deziro de multaj, la franca esperantoinstruisto Madeleine Haudebine aranĝos novajn kursojn en Borås.

Lige kun mallonga prelego pri Parizo (kiu estis interpretita) provleciono estas aranĝota lunde 20 januaro je 8 h en 3:a etaĝo de la urba biblioteko (ABF). Interesitaj estas invititaj senkoste ĉeesti la prelegon kaj provlecionon.

Nya esperantokurser i Borås 18/1 1936

På mångas begäran anordnar den franska esperantoläraren Madeleine Haudebine nya kurser i Borås.

I samband med ett kort föreläsning Paris (vilket översattes) kommer provlektion att hållas måndagen den 20 januari kl 8 em i stadsbibliotekets 3:dje vån. (ABF). Intresserade inbjudes att gratis övervara föreläsning och provlektion.

Iomete pri Valdemar Langlet, kiu verŝajne logis la paron Szilágyi transloĝiĝi al Svedio

Lite om Valdemar Langlet som troligen lockade paret Szilágyi att flytta till Sverige

El radio P4 Sörmland. Helena sendis la artikolon.



El propra iniciativo Valdemar Langlet eldonis pasportojn al persekutataj judoj.

Foto privata / Valdemar Langlet tog eget initiativ till att utfärda pass till

förföljda judar. Foto: privat

Milita okulvididinto: La heroo el Lerbo savis dekmilojn da judoj en Budapeŝto

Publikigita ĵaŭdon 7 majo 2015

Pasis 70 jaroj de post Germanio kapitulaciis kaj la dua mondmilito finiĝis en Eŭropo. Kelkaj el tiuj, kiuj signifis multe por savi judojn el la sorto iri al koncentrejoj, estas **Valdemar kaj Nina Langlet**.

En marto 1944 la germanoj okupis Hungarion kaj kune kun la hungara nazia kaj antisemita sagkruca movado la preparoj por neniigi la judan loĝantaron komenciĝis. La paro Langlet savis la vivon de 10 000 judoj en Budapeŝto fine de la milito.

Valdemar Langlet estis naskita en la 1870-aj jaroj en Speteby Hall en Lerbo inter Katrineholm kaj Flen, kie la patro estis konstruiginta rozkoloran palacon kun kvar turoj.

Monika Langlet, la nepino de Valdemar, rakontas kiel ŝi nur longe poste komprenis kio ŝi avo efektive signifis por la transvivantoj en

Krigsvittne: Hjälten från Lerbo räddade tiotusentals judar i Budapest

Publicerat torsdag 7 maj 2015

Det är 70 år sedan Tyskland kapitulerade och andra världskriget tog slut i Europa. Några av dem som haft stor betydelse för att rädda judar från att hamna i koncentrationsläger är **Valdemar och Nina Langlet**.

Det var i mars 1944 som tyskarna ockuperade Ungern, och tillsammans med den ungerska nazistiska och antisemitiska pilkorsrörelsen påbörjades förberedelserna för att utplåna den judiska befolkningen. Paret Langlet räddade livet på 10 000-tals judar i Budapest i slutet av kriget.

Valdemar Langlet föddes på 1870 talet på Speteby Hall i Lerbo mellan Katrineholm och Flen där fadern lät bygga ett rosa slott med fyra torn.

Monika Langlet, Valdemars barnbarn berättar hur hon först långt senare insåg vad hennes farfar egentligen betytt för de överlevande i

Budapeŝto, kie lernejo kaj strato portas lian nomon.

Post la milito ili revenis al sia somerdometo Solbacken, kiu situas apud la infantempa hejmo de Valdemar Langlet, Speteby Hall.

– Ili ja ne povis loĝadi en tiu somerdometo. Ili ne havis monon och tiam ili skribis ĉi tiun libron, **”Verk och dagar i Budapest”** (Faroj kaj tagoj en Budapeŝto), kaj tiam li ricevis iom da mono kaj Nina laboris kiel pianoinstruistino en la muziklernejo en Katrineholm.

Katarina Wahlström

Budapest där en skola och en gata fått sitt namn efter honom.

Efter kriget återvände de till sin sommarstuga Solbacken, som ligger bredvid Valdemar Langlets barndomshem Speteby Hall.

– De kunde ju inte bo i den där sommarstugan. De hade inga pengar och då skrev han den här boken, **”Verk och dagar i Budapest”** så då fick han in lite pengar och Nina jobbade som pianolärare på musikskolan i Katrineholm.

Katarina Wahlström

katarina.wahlstrom@sverigesradio.se

La Halovena skiisto

de Lasse Granat

Iam en la 1970-aj jaroj, denove estis tempo por ”Halovena” festo en Stokholmo. Mi laboros la sekvan lundon en Stokholmo, do mi prenis trajnon kiu foriris malfrue sabate posttagmeze.

Mi estis alivestiĝonta en la trajno. Ĉi-foje, mia alivestiĝo ne estu tiom ekstrema, ke mi ne povu preni publikan transporton en Stokholmo kaj ankaŭ povu piediri relative nerimarkite.

Mi estu la respondo de la kontinenta Eŭropo al la sveda skilegendo, ”Ungemaar Stonemark” (Ingemar Stenmark). Tamen, li estos konsiderinde malpli sukcesa ol sia antaŭulo.

En tiu tempo, ili ĉiam iris unuaklase kiel dungito ĉe L-M Ericsson. Sabate posttagmeze tia signifis, ke mi ricevis tutan unuaklasan kupeon por mi. Mi sidis kaj legis plejofte. La konduktoro enrigardis de tempo al tempo kun ekkrio: ”Sekva Skövde!”, ”Sekva Hallsberg!” kaj tiel plu. Ĉiufoje ni interŝanĝis kelkajn ordinaraĵn, afablajn vortojn. Li certe sentis sin iom soleca, pensante. Li opiniis, ke sonas agrable iri al Stokholmo por iri al festo kun bonaj amikoj. Kvankam mi ne aspektas



aparte respektema, mi estis almenaŭ unuaklasa vojaĝanto kaj tiam li opiniis, ke mi devas esti iom respektinda homo kun deca rondo de konatoj. Post la krio ”Sekva Södertälje!” mi komencis elpreni mian kostumon. Kiam la trajno ekveturis de Södertälje, mi havos iom pli ol duonhoron por vestiĝi antaŭ ol ni alvenos al Stokholmo.

Mi komencis involvi larĝan blankan gazan bandaĝon ĉirkaŭ unu kruro ekster la pantalono, fiksante per bendo kaj gluante sure iom hele ruĝa karamelkoloro. La sama

traktado sur la alia kruro, sed sur la femuro. Sur tiu kruro, mi surmetis skiboton anstataŭ la ŝuon. Mi ankaŭ envolvis mian tutan kapon per blanka gazo kun ruĝaj makuloj jen kaj jen. Paro da fendiĝintaj skiokulvitroj pendis en sia rimeno ĉirkaŭ la kolo. Paro da pecoj de glua plastro kruciĝis super unu vango kaj tiam la maskado estis farita. La tuta ekipaĵo estis kompletigita per antikva skibastono kun giganta "kringo" kaj regula lambastono, kiun oni havas por rompitaĵoj.

Mi estis preta ĝustatempe. Nun la pordo malfermiĝas kaj la konduktoro eniras: "Sekva Stok... Kia diable...! Ĉu vi estas vundita? Ĉu mi haltigu la trajnon?"

Nun, kompreneble, mi pensis, ke estus sufiĉe amuze, se li estus tirinta la kriz-bremson en Älvsjö, sed mi malakceptis la proponon dirante, ke tiam mi verŝajne malfruos al mia festo, kiu estis maskobalo. Li baldaŭ

trankviliĝis kaj diris, ke nun li havas bonan rakonton por rakonti ĉe sia familia festo tiun vesperon. Li deziris al mi bonŝancon kaj kiam mi tiam eliris el la trajno, li deĵoris helpi "la kompatindan invalidon" malsupren sur la kajon. Kelkaj homoj sur la kajo rigardis iom demande, ne al mi sed al la konduktoro, kiu ridis pri povra kriplulo.

En la metroo kaj poste en la buso, ne multaj homoj levis la brovojn, ni ja estis en Stokholmo, Dio, savu nin. Eĉ ne promenante al la festo-loĝejo. Sed tie estis multe pli granda tumulto, ĉiuj helpis min per valizo kaj lambastonoj kaj "prizorgis" miajn vundojn. Mi ricevis, por pure terapiaj celoj, kompreneble, multajn taŭgajn medikamentojn kun kaj sanigaj, sendolorigaj kaj vigligaj efikoj. Bonega amuzo!

Mi ricevis la unuan premion ankaŭ ĉi-jare.

La granda translokado de la preĝejo en Kiruna

Den stora kyrkflytten i Kiruna



La unua tago 8 horojn

En rekta elsendo ni sekvas la mond-unikan translokadon de la preĝejo Kiruna, de la malnova urbocentro al ĝia nova loko, kvin kilometrojn for. La grava translokado daŭras

Första dagen 8 tim

I direktsändning följer vi den världsunika flytten av Kiruna kyrka, från gamla stadskärnan till dess nya plats, fem kilometer bort. Den stora kyrkflytten tar två dagar och är

du tagojn kaj estas parto de la ampleksa urba transformo. La ikoneca preĝejo estas 40 metrojn larĝa, 35 metrojn alta kaj pezas 672 tunojn. La laboro postulas ekstreman precizecon kaj nenio devas misfunkcii.

La ciferoj indikas la progreson de la tempo ekde la starto de la translokado.

en del av den omfattande stadsomvandlingen. Den ikoniska kyrkan är 40 meter bred, 35 meter hög och väger 672 ton. Arbetet kräver extrem precision och ingenting får gå fel.

Siffrorna visar tidsåtgången från starten av flytten.

- 1:14** La preĝejo kaj la veturo estas beatita – *Kyrkan och färden välsignas*
- 1:53** Tiel oni traktas la kliniĝon de la preĝejo – *Så hanteras lutningen på kyrkan*
- 2:09** Ann-Helén Laestadius: "Korŝire vidi ĉi tion – *Hjärtslitande att se det här*"
- 2:41** Tiel oni preparis la preĝejo por la translokado – *Så förbereddes kyrkan för flytt*
- 2:59** La paroĥestro pri la preparoj – *Kyrkoherden om förberedelserna*
- 3:47** La domtranslokisto: "La altarbildo estas tute stabila" – *Husflyttaren: "Altartavlan står helt still"*
- 4:13** "Kiu volas vidi sian hejmon malaperi? – *Vem vill se sitt hem försvinna?"*
- 4:48** Tial la altarbildo restas en la preĝejo dum la translokado – *Därför är altartavlan kvar i kyrkan under flytten*
- 6:04** Fotoj de la spektantoj pri la preĝejo – *Tittarbilder från Kirunas kyrka*
- 6:05** Tomas Kuhmonen el la samea vilaĝo Gabna pri Girkujeaggi ĝis en la 1950-aj jaroj – *Tomas Kuhmunen, Gabna sameby, om Girkujeaggi ända in på 1950-talet*
- 7:11** Koncizaj ciferoj pri la translokado – *Snabba siffror om kyrkflytten*
- 7:56** La aganta direktoro de LKAB pri la translokaj kostoj – *LKAB:s vd om kostnaden för flytten*



La dua tago – Andra dagen

- (10:04** Tiel la preĝejo estis levita sur la trenveturilojn – *Så lyftes kyrkan upp på trailarna)*
- 18:27** Tiel la preĝejo estos metita sur la nova loko – *Så placeras kyrkan på den nya platsen*

- 20:03** Ĉu la operatoro povas misgliti per la dikfingro? – *Kan operatören slinta med tummen?*
- 21:16** Pri la signifo de la virinoj pri la ercminado –
Om kvinnornas betydelse för malmbrytningen
- 1:11** Mallarĝa ĝirejo – *Tight kurva*
- 1:12** La aganta direktoro de LKAB: Tial oni translokas la preĝejon –
LKAB:s vd: Därför flyttas kyrkan
- 1:30** "La altarbildo – defio – *Altartavlan – en utmaning*"
- 1:43** La verkisto Mattias Timander: "Neordinara okazaĵo" –
Författaren Mattias Timander: "Sjuk grej"
- 1:58** *Pride* de Kiruna pri la ĉielarkaj diservoj – *Kiruna Pride om regnbågsmässorna*
- 2:05** Pri la kampanilo – *Om klockstapeln*
- 3:27** Mapo pri la preĝejo-arbaro – *Karta över kyrkoskogen*
- 4:29** Carola: "Estos aparta muzikludado – *Blir en speciell spelning*"
- 4:45** La transformado de la urbo Kiruna – *Stadsomvandlingen i Kiruna*
- 5:36** Diservo – *Gudstjänst*
- 6:19** Delikataj manovroj ĉe la celo – *Finlir vid målgången*
- 6:23** Reĝa vizito dum la translokado – *Kungligt besök under kyrkflytten*
- 6:27** La lasta stadio de la translokado – *Sista skedet i kyrkflytten*
- 6:32** Fanfaro por la preĝejo! – *Fanfar för kyrkan!*

Ja, ne nur la preĝejo estis translokita. Preskaŭ la tuta urbo Kiruna estis translokita por fari lokon por la pilargigo de la minejo.

Ja, det var inte bara kyrkan som flyttades. Nästan hela staden Kiruna flyttades för att ge plats för utvidgning av gruvan. / Siv

"Ni ĉiuj estas valonoj", libro de Peter Sjölund

Recenzo de Ingemar E Nilsson. Sendita de Roger Nilsson.

"Ni ĉiuj estas valonoj" (Alla är vi valloner) estas la eble iom surpriza titolo de la libro de Peter Sjölund pri veraj kaj falsaj familiahistorioj en Svedio.

Sjölund estas konsiderata la plej elstara sveda fakulo pri DNA-geneologio kaj fariĝis konata al la ĝenerala publiko kiam li uzis DNA-teknologion por helpi solvi altprofilan duoblan murdon en Linköping.

La librotitolo kompreneble aludas al la fakto, ke en preskaŭ ĉiuj aliaj familioj kun radikoj en

Svedio oni parolas pri la ekzisto de valonoj. En multaj (plej multaj) kazoj tio ne estas vera, sed la rakontoj estas konservitaj ĉar "estas agrable esti valono".

Kiel eblas, ke "esti de valona deveno" (reala aŭ fikcia) ricevis tian altan statuson kaj estas io, kion homoj volas emfazi? Sjölund ĉefe spuras du kialojn por tio, ambaŭ datiĝantaj reen pli ol cent jarojn.

Kiam la glortempo de la valonoj* en la sveda industrio finiĝis, ili baldaŭ trovis sin kun nova

vivo, nova tasko – kiel rolmodeloj en la sveda socio.

La emerĝanta sveda laborista movado, en siaj skribaĵoj kaj ĉe siaj kunvenoj, elstarigis la valonojn kiel idealon por laboristoj. Ili estis, oni kredis, laboristoj kun alta disciplino kaj granda kapablo, io simila al la "herooj de laboro".

Preskaŭ samtempe kaj paralele, la svedaj rasbiologoj eniras la scenon. Ili prezentas la valonojn kaj iliajn posteulojn kiel ekzemplajn homojn kun nur bonaj karaktertraĵoj. Kontraste al ĉiuj aliaj malhelhaŭtaj kaj malhelharaj homoj. La ideoj de la rasaj biologoj pri la genetikaj karakterizaĵoj de la valonoj, tute malsamaj ol aliaj nordiaj "rasaj tipoj", estas eksponitaj al la tuta sveda popolo, ne nur per skribaĵoj sed ĉefe per la granda sveda "popolspaca ekspozicio", kiu turneas la landon kaj regnon en 1919.

Ĝin subtenas pluraj grandaj nomoj ene de la kultura elito de la tempo, kiel ekzemple Anders Zorn kaj Ellen Key. La celo de la ekspozicio estas montri malsamajn "rasajn tipojn" en Svedio.

La svedoj reprezentas la "puran nordian tipon", dum aliaj etnaj tipoj estas prezentitaj kiel homoj kun malalta statuso kaj malbonaj karakterizaĵoj. La valonoj, aliflanke, estas pentritaj kiel rasa grupo, kiu, ekde la 17-a jarcento, estas inkludita en la sveda loĝantaro kaj kontribuas per pozitivaj karakterizaĵoj. La sama bildo ankaŭ estas disvastigita kun granda efiko, ekzemple ĉe la fama Stokholma Ekspozicio en 1930.

Per tiuj du malsamaj sed parte interkovrantaj vojoj – la laborista movado kaj la rasaj biologoj – solida bredejo kreigis por la ideo pri la alta statuso de la valonoj kaj tiel la kredo, ke povus esti valonoj en la propra genlinio, eĉ se ne ekzistis fakta pruvo por tio.

Kaj kiel Sjölund diras: La ora brilo de la valonoj ekde la mezo de la 20-a jarcento

PETER SJÖLUND



Alla är vi VALLONER

Om sanna & osanna släkthistorier i Sverige
NORSTEDTS

ankoraŭ brilas hele hodiaŭ en multaj familioj, sen ke oni vere sciis, kial la familio parolas pri valonoj.

Bazite sur la dominaj "valonaj mitoj", Sjölund plilarĝigas la perspektivon en sia libro al tio, kion li ironie nomas "kreiva genealogio". Kun fokuso sur la ŝika familio Buresläkt en norda Svedio, la familio Drottninggätten sur Tjörn kaj la familio Skankeätten en Jämtland – tri ekzemploj de kiel miraĝo de blua sango povas blindigi genealogojn – Sjölund priskribas la ripetiĝantan praktikon pli-malpli "inventi" belan kaj malnovan genlinion.

La reĝa familio estis la unua, kiu uzis ĉi tiun metodon, sed la fenomeno baldaŭ disvastiĝis al la nobelaj familioj, kiuj volis fari kiel la reĝa familio kaj, pro statusaj, ekonomiaj kaj potencpolitikaj kialoj, akiri longan kaj gloran familian historion, sendepende de ĝia vereco.

En modernaj tempoj, kun la apero de la interreto, la mitoj pri granda genlinio akiris novan fortan disvastiĝon. Elpensitaj familiaj branĉoj estas kopiitaj, afiŝitaj en retejoj kaj enmetitaj en datumbazojn, sen fontesplorado kaj fontkritiko.

Ni ĉiuj estas Valonoj (Norstedts 2023, 245 paĝoj) estas facile alirebla, amuza kaj

pensinda libro pri genealogio kaj kiel ĝi devus – kaj ne devus – esti farata. En la finaj ĉapitroj, Sjölund prezentas "kaŝitajn kaj forgesitajn familiajn historiojn", elekton de personaj rakontoj kaj vivdestinoj, kiuj estas almenaŭ tiel interesaj kaj ekscitaj kiel tiuj de nobelaj familioj.

"Rakontoj kiuj kuŝas en arkivoj, gazetoj kaj ekleziaj registroj, nur atendante esti malkovritaj. Rakontoj kiuj revivigas niajn prapatrojn kaj prapatrinojn. Rakontoj kiuj

donas karnon al la ostoj de tradiciaj genealogiaj arboj kiuj ofte konsistas nur el aro da nomoj kaj jaroj.

Genealogio estas multe pli ol nur sekvi la vojaĝon de familiaj branĉoj tra la historio."

Ingemar E Nilsson

*) La "valonoj" estis metiistoj el Belgio/Norda Francio kun scio kiel trakti feron, kiuj venis al la feruzinoj en Svedio dum la unua duono de la 17a jarcento. *N. d. r.*

Svedaj libro- kaj gazetkolektoj en Esperanto

Svenska bok- och tidningssamlingar på Esperanto

www.biblioteko.esperanto.se

Kial la retejo estas grava?

"Esperanto ne havas kulturon, nek historion". Jen unu el la argumentoj kontraŭ Esperanto, kiun ni de tempo al tempo aŭdas de skeptikuloj pri nia lingvo. Gravas por ni povi montri ke tiu aserto ne estas prava. Gravas ankaŭ disponigi al homoj, kiuj volas fari esplorklaboron, facile atingeblan materialon.

En la retejo www.biblioteko.esperanto.se ni celas kolekti kaj gardi nian historion kaj kulturon. Tutlandaj kaj lokaj gazetoj donas informojn pri la esperanta vivo tra la jardekoj. Nun estas ses gazetoj/informiloj troveblaj kaj ni daŭre kompletigas ilin.

Gazeteltondaĵoj montras kion skribis ĵurnalistoj pri ni. Ekzistas eltondaĵoj ekde la komenco de la pasinta jarcento.

Ĉu vi havas tiajn, kiuj mankas en nia kolekto? Bonvolu skani ilin kaj kompletigu la kolekton. Estas multe da interesaj legaĵoj pri niaj pioniroj. Ne mankos al malnovaj esperantistoj nostalgio dum legado pri pasintaj jardekoj.

Grava tasko por la estonteco estas konzervi la bibliotekon en Malmö, kiu nun konsistas el 7.000 titoloj. La biblioteko estas kunmetaĵo de libroj de SEF kaj la klubo en Malmö. La tuto estas posedata de SEF kaj sekve apartenas al la tuta sveda membraro. Ni memoru ke kun posedo sekvas respondeco.

Se vi ne jam konsultis la ligilon al la bibliotekoj mi proponas al vi fari tion. Librojn, el kiuj ni havas plurajn ekzemplerojn, ni ofertas al vi por malalta prezo.

Ĉu vi havas problemon skribi esperantajn literojn? Vi trovas tre praktikan solvon por instali klavaron.

Fine vi trovos informojn pri iuj organizoj, grandparte kompletigitaj.

Bonegan laboron konstrui la retejon faris Andreas Nordström. Pri la biblioteko en Malmö laboras Ann-Louise Åkerlund, Per-Olov Johansson kaj la subskribinto.

Kontaktu nin se vi volas kontribui!

[esperantoagado\(a\)outlook.com](mailto:esperantoagado(a)outlook.com)

Sten Svenonius

Svenska bok- och tidningssamlingar på Esperanto



Ŝanĝi
lingvon

Viktigt söktips! Google OCR-avläser (helt eller delvis) pdf-filerna, så man kan fritext-söka på dem. Skriv i Googles sökfält ditt sökord följt av
`site:biblioteko.esperanto.se` När det gäller tidningsurklipp kan man kombinera med en sökning under Tidningsurklipp > Alla

Tidskrifter

LINGVO INTERNACIA – monata gazeto por la lingvo Esperanto, eldonata de la Klubo Esperantista en Uppsala

Svenska Esperantotidningen La Espero – organ för Esperantorörelsen i Sverige

Kelklinie pri... – organ för La Venkonta Stelo, Norrköpings Esperantoklubb

inter-LIGILO / Membroletero – organ för Göteborgs Esperantoförening

Ora Ĵurnalo – läsmagasin från Göteborgs Esperantoförening

La Folio / Ponto — La Folio – Informilo por esperantistoj en suda Svedio / Ponto – Organo de Sunda Esperanto Agado

Tidningsurklipp

Alla* Odaterade 1901 1903 1905 1906 1907 1908 1909 1910 1911 1912 1913 1914 1915
1916 1917 1918 1919 1920 1921 1922 1923 1924 1925 1926 1927 1928 1929 1930 1931

www.biblioteko.esperanto.se

Bibliotek

Biblioteken SEF Malmö och Göteborgs Esperantoklubb

TIPS 1: För att markera en hel rad i katalogen (för att sen kopiera den): håll ner Skift och klicka i raden.

TIPS 2: För att snabbt se böckerna under en viss kategori (genre): klicka på 'förkl.' under Kategori och sen på önskad kategori.

TIPS 3: Installera tangentbord med svenska och esperantiska bokstäver, av Johan Svenonius.

Distrikt och klubbar

Södra Distriktets historia

Lite om esperantos historia i Helsingborg

Malmö Esperantoförening:

J. Ströme: Esperantos historia 1859–1983

Övrigt

Språkseminariet på Nordiska Folkhögskolan 30 okt – 2 nov 1992

Administrerad av den s.k. Framtidsgruppen. Medlemmar:

Sten Svenonius <fidinda@outlook.com> och Andreas Nordström <arendsian@hotmail.com>

Relaterade hemsidor: Svenska Esperantoförbundet – Malmö Esperantoförening – Göteborgs Esperantoklubb.

Denna hemsida är skapad av Andreas Nordström (e-post: som ovan). Bilder från Icons8. Senaste uppdatering 2025-12-01.

INTERNACIA LITERATURA ESPERANTA KONKURSO

"HRISTO GOROV-HRIMA" – 2026

Hristo Gorov – Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso estos por **eseo**. La temo de la eseo estas:

"MIA LA PLEJ BELA ESPERANTO-REMOMORO"

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu eseo, originale verkitaj en Esperanto. La verko estu tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu Esperantan alfabeton per supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la

aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefono kaj interretadreso. La eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la literoj estu Times New Roman – 12 punktaj

La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 30-a de septembro 2026 al Georgi Mihalkov, prezidanto de la ĵurio, retadreso:

modest.mihalkov@gmail.com



Kiu dato de Maratona kursaro kun prelegoj komence de julio 2026?

Saluton

Vi jam restadis en Greziljono por lerni aŭ praktiki Esperanton.

(A) de lundo 29a de junio ĝis ĵaŭdo 10a de julio – la unuaj tagoj okazos antaŭ la lernejoj ferioj (francaj).

(B) de lundo 6a de julio ĝis ĵaŭdo 16a de julio – oni povos spekti la artfajraĵojn de la 14a de julio en Baougé,

Kiuj datoj pli taŭgas, ĉu A aŭ B?

Antaŭ aŭ post tiu Maratona kursaro restas 6 liberaj tagoj por alia E-evento.

Ĉu vi havas ideon? Ĉu vi ŝatus inviti viajn E-amikojn aŭ vian familion al Greziljono?

Dankon

M.C.E – Maison Culturelle de l'Espéranto

1310 route du Lude, Grésillon – Saint Martin d'Arcé– 49150 Baugé en Anjou – Francio

Telefono: 02 41 89 10 34 (respondilo)

E-poŝto: kastelo@gresillon.org

Sajto: www.gresillon.org

SIREN: 522 621 556



Esperanto-Kulturdomo